

## Tut-Amerika Kongreso de Esperanto, Montrealo, Kanado

**Humphrey Tonkin**

Inaŭgura Parolado, 13 julio 2008

### De Unueco al Diverseco: La Amerikoj

La kontinentoj, kies esperantistoj kunvenas tie ĉi en Montrealo en 2008, etendiĝas de unu fino de la mondo al alia – granda strio de diverseco kiu tratanĉas la terglobon de nordo al sudo, de sudo al nordo. Tiu diverseco manifestiĝas unuavice en granda diverseco de kulturoj, kiujn la eŭropaj koloniistoj puŝis en defendan pozicion sed neniam plene eliminis. En Meksikio kaj Gvatemalo, en Bolivio kaj Paragvajo, en Brazilo kaj Surinamo, estas ankoraŭ parolataj kaj uzataj centoj da lingvoj. En Usono kaj Kanado la sorto de indiĝenaj popoloj estas tia, ke ili apenaŭ retenas sian ekziston, kvankam ankaŭ ĉi tie la spuroj de tutaj civilizoj ankoraŭ restas kaj estas eltroveblaj.

La grandaj ondoj de enmigrintoj portis la hispanan, portugalan, francan kaj anglan lingvojn al niaj kontinentoj. La novaj alvenintoj jen asimilis la jamajn enloĝantojn jen kruele eliminis ilin – ĉu per spado kaj pafilo ĉu pro alporto de novaj malsanoj. Sed eĉ la koloniistoj ne unuigis la kontinentojn: la portugala kaj hispana kulturoj evoluis paralele, ofte prenante novajn formojn nekonatajn en la tiel nomataj patrinaj landoj. Same la franca. Same la angla. Venis amase aliaj popoloj kiel enmigrintoj – italoj (precipe en Argentino kaj Usono, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj), germanoj, skandinavo, hindoj, poloj, orienteŭropaj judoj. La perforta alportado de afrikanoj tra tri jarcentoj de sklavkomerco ankaŭ alvenigis kulturajn elementojn. Hodiaŭ, kiam transportado estas pli facila kaj la moviĝo de popoloj estas pli granda, la enmigrado ankaŭ de azianoj, afrikanoj – homoj el ĉiuj partoj de la mondo – fariĝis pli ofta.

Antaŭ iom pli ol cento da jaroj, kiam Esperanto naskiĝis, oni malpli ofte parolis pri diverseco ol oni tion faras hodiaŭ. En Kanado kaj Usono, en Brazilo kaj Argentino, en Ĉilio kaj Venezuelo oni emfazis la unuecon – la nocion, ke homoj, veninte el plej diversaj mondopartoj, formetos sian iaman identecon kaj fariĝos usonanoj, kanadanoj, brazilanoj. Oni kvazaŭ kreis novajn kulturojn respondajn al la novaj ŝtatoj. Zamenhof rekonis en la naciismo grandan minacon, sed li agnoskis la potencon de patriotismo kaj la homan emon identigi sin kun difinita terpeco, difinita origino. Vorto, kiun oni malofte trovas en paroladoj de Zamenhof kaj liaj samtempuloj tamen estas diverseco: akceptante la diversecon kiel parton de la homa sorto, Zamenhof interesiĝis pri la potencialo de Esperanto por transponti diferencojn, por trovi la esencan homecon en la homoj.

Tio kion Zamenhof inventis kaj tio kio ĝi poste fariĝis estas du diversaj aferoj. La unuaj dekkvin aŭ dudek jaroj de Esperanto estis periodo de ekĝermo de la Zamenhofa ideo, sed ankaŭ de la praktika uzo de la lingvo. Kiam Hector Hodler antaŭ precize cent jaroj fondis Universalan Esperanto-Asocion, Esperanto jam fariĝis komunumo de

lingvoparolantoj: la lingvo estis jam survoje al maturiĝo. Ni povas nomi la unuajn du jardekojn de Esperanto periodo de eksperimentado, de pripalpado. Fondiĝis landaj Esperanto-asocioj, gazetoj aperis, la unuaj literaturaj verkoj estis produktitaj. La okazigo de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905 kaj la fondiĝo de UEA en 1908 estis la komenco de la matura Esperanto.

La unua internacia kongreso de esperantistoj en Boulogne-sur-mer ne estis nomita “universala” sed tiu epiteto baldaŭ gluiĝis al la kongresoj. Kial “universala”? Gi estas vorto kiu respegulas la progreseman pensadon de tiu epoko. Ĝi diferencas de la vorto “internacia” en tio, ke ĝi ne agnoskas naciojn entute: ĝi emfazas la ĉiaman aplikeblon de difinita nocio, sendepende de la fono de la koncernaj homoj. En la periodo inter proks. 1880 kaj proks. 1910, dum mallonga momento, estis sufiĉa optimismo inter la nove aperanta burĝa klaso en Eŭropo, por ke ili pensu entute pri la nocio de universalaj valoroj, de homeco sendepende de nacieco, kaj eĉ ili revis pri la ideo, ke povu ekesti sistemo por la paca solvado de internaciaj disputoj. La rekresko de naciismo en la jaroj antaŭ la unua mondmilito estingis tiun optimismon: tajdo de brutaleco, el kiu ni ankoraŭ ne elgrimpis, sufokis tiujn altajn idealojn. Estas signife, ke la UEA de Hodler estis asocio de individuoj: ĝi ne similis la modernan UEA, en kiu individuaj membroj kaj landaj asocioj dividas la potencon. En la universala asocio, kiun Hodler fondis, estis reprezentita unuavice la universala aplikeblo de Esperanto.

Se Zamenhof kaj Hodler malmulte parolis pri diverseco kiel virto kaj valoro, ili surprize malmulte parolis pri la apenaŭ imageblaj teknologiaj ŝanĝoj de tiu periodo. Sajne ili simple akceptis ilin. Lastatempe mi verkis etan gvidlibron pri la kvartalo de Roterdamo en kiu la Centra Oficejo troviĝas. La domo, kiun la Asocio okupas jam preskaŭ kvindek jarojn, estis ekkonstruita unu monaton post la apero de la Unua Libro, do en aŭgusto 1887. Mi trovis kelkajn poŝtkartojn el tiu frua epoko, kiuj montras tre trankvilan Nieuwe Binnenweg, la straton, kie situas la domo. En la plej frua, ĉevaloj tiras omnibuson laŭ strikta vojo inter ĝardenetoj; en dua tramoj haltas ekster la domo kie nun troviĝas UEA. En pli postaj poŝtkartoj, aŭtoj aperas – kaj ĉio ĉi ene de dudek jaroj. Inter 1887 kaj 1908, telefonoj ĝeneraliĝis almenaŭ ĉe komercaj entreprenoj, elektro anstataŭis gason, la benzina motoro inaŭguris la epokon de la aŭtomobilo kaj kamiono. Zamenhof kvazaŭ nerekte aludas tiujn novajn inventaĵojn kiam li skribas pri “forta voko” kaj “nova sento” kiuj trakuras la mondon per flugiloj de facila vento – vortoj kiuj moviĝas kvazaŭ elektra impulso tra la spirita telegrafo de la homaro.

La novaj inventaĵoj malfermis al la homaro novajn eblecojn bonajn kaj malbonajn. Esperanto ekestis precize en momento kiam la nova teknologio povis disvastigi ĝin. La organizaĵoj, kiuj ekestis en la Esperanto-movado uzis la novajn teknologiajn rimedojn por prezenti al la mondo sian ideon. Ne estas surprize, ke post la Unua Mondmilito centra komitato esperantista estis formita inter la landaj asocioj por kunordigi ilian agadon – kvankam ankaŭ ĝi disfalis en la 1930aj jaroj. Dum la intermilitaj jaroj oni fondis la unuan aŭtentike mondan organizaĵon, la Ligon de Nacioj, sed ĝi estis konstruita parte el la postlasita idealismo de la antaŭmilitaj jaroj kaj parte el la konkurencado de la ŝtatoj.

Same kiel la Ligo, UEA kompromitiĝis en la jaroj tuj antaŭ la Dua Mondmilito, kaj Esperanto ne povis rezisti al la fortoj de naciisma milito. Post la Dua Mondmilito UEA unuigis la du vojojn al monda organiziĝo – individuojn kaj asociojn.

La nova organizaĵo Unuiĝintaj Nacioj komencis optimisme, same kiel la Esperanto-movado rekomenciĝis post katastrofaj jaroj. Unu granda atingo de tiu epoko estis la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu festas ĉi-jare sian sesdekan datrevenon. La Universala Deklaracio (notu la epiteton) ricevis lokon kiel baza principo en la statuto de UEA.

En tiuj jaroj la argumentoj por Esperanto restis esence la samaj: la diverseco de lingvoj konsistigas barilon, kiu malhelpas la interkomunikadon. Esperanto ebligas transsalton de tiu baro. Oni parolis pri “la lingva problemo,” kvazaŭ la diferenco de lingvoj konsistigas obstaklon. Nur en la 1970aj jaroj la argumentado por Esperanto komencis agnoski la veran komplikecon de la lingva situacio en la mondo. Du etaj ekzemploj: la revuo LMLP, *La Monda Lingvo-Problemo*, fariĝis LPLP, *Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado*; CED, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo fariĝis la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. En kaj ekster UEA, oni komencis interesiĝi pri diskriminacio surbaze de lingvoj (unu el la ekzemploj ofte citata tiutempe estis la kebekia lingva situacio), oni ekokupiĝis pri lingvaj rajtoj, oni konsciiĝis pri demandoj de lingva egaleco. Kaj ĉefe oni komencis rekoni ne, ke ekzistas profunda lingva problemo – do nekapablo kompreni unu la alian – sed ke ekzistas lingva malegaleco, ĉefe pro fortiĝo de la angla lingvo. Eble la ĉefa obstaklo al disvastigo de Esperanto estis entute konvinki la homojn, ke ili havas problemon – ke lingva malegaleco estas en si mem neakceptebla kiam ekzistas rimedo por forigi ĝin. Esperanto fariĝis solvo, kiu serĉas problemon, egaleca komunikilo en mondo kie oni tro facilanime akceptas malegalecon de komunikado kvazaŭ oni povus nenion fari por forigi ĝin. Tiu agnosko de la veraj strukturoj de la internacia lingva komunikado estis eble la unua paŝo al ŝanĝiĝantaj Esperanto-idealaj; sed ili ne respeguliĝis en strukturaj ŝanĝoj.

La organizaj strukturoj de UEA kaj de la landaj asocioj ne multe ŝanĝiĝis. Oni povas diri, ke la unua jarcento de internaciaj Esperanto-organizaĵoj, komencita komence de la dudeka jarcento, montris fundamente senŝanĝajn karakterizojn: asocioj nutrataj ĉefe de la kotizoj de membroj, kun siaj presitaj gazetoj kiel ĉefaj produktoj, kaj siaj servoj. Estis malfacile entute esti aktiva esperantisto sen formala aliĝo al iu kolektivo – loka grupo, nacia aŭ landa asocio, internacia asocio, kiu siavice sentis devon redoni al la membroj la valoron de iliaj kotizoj. UEA, ekzemple, havis kaj ankoraŭ havas du funkciojn: servi al la membroj kaj disvastigi Esperanton, sed la disvastigo de Esperanto okupas duan lokon post la kontentigo de la kotizpagantoj.

Se en la unuaj jaroj de Esperanto okazis profundaj ŝanĝoj en la monda komunikado – fizika komunikado (transporto ktp.) kaj nefizika (telegrafo kaj telefono bazitaj sur elektro), kaj se en 1908 UEA fondiĝis kvazaŭ kiel spegulo de tiuj novaj rimedoj – do kiel kreaĵo de sia epoko; kaj se oni tiutempe pasis tra mallonga periodo de optimismo pri la kapablo de homoj vivi en paco, same respegulata en la nove fondita UEA, Ŝajnas, ke en multaj rilatoj nun finiĝas ciklo: ni revenas al la komenco.

La pasintaj dudek jaroj montris la plej profundajn ŝanĝojn en la mondaj komunikaj strukturoj, kiujn oni vidis depost la epoko de Zamenhof kaj Hodler. La procedo komenciĝis pli frue per la apero de, unuflanke, malmultekosta aera transporto, kaj, aliflanke, la komputilo. La revolucio okazis kiam komputiloj kaj distanca komunikado kunfandiĝis. Hodiaŭ, Interreto rapide disvastiĝas, tiel ke eĉ en evoluantaj landoj reta komunikado fariĝas facila. Kaj se oni havas aliron al Interreto oni havas aliron al tuta universo de rimedoj por fariĝi aktiva esperantisto.

Tiu komunika reto, kiu nun ekestas estas esence neregebla de formalaj organizaĵoj. Komitatoj kaj estraroj povas fari siajn dekretojn, sed la esperantistoj iros propran vojon; ili povas eldoni siajn gazetojn, sed la esperantistoj simple kreos la proprajn ĉe la reto; ili povas funkciigi siajn libroservojn, sed Esperanto-libroj komencos aperi en aliaj neesperantistaj medioj, aŭ eldoniĝos en virtuala, ne papera, formo. Se temas pri landaj asocioj, la anoj de difinita lando simple ekkomunikas trans la landlimoj sen peti permeson de la landaj asocioj.

Tiu manko de la iama dommastrumado, kie ĉio havis sian lokon kaj regis ordo, sentiĝas ne nur en la Esperanto-movado sed en la mondo ĝenerale. Longa artikolo en *The Economist* de la 5-a de julio notas, ke la iamaj mondaj institucioj ĝenerale bone funkciis, sed la apero de nove potencaj landoj kaj diversaj mondaj danĝeroj minacas ilian superecon. UN, Unesco kaj la aliaj “tradiciaj” organizaĵoj ne estas sufiĉe adapteblaj al la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj kaj fariĝas ĉiam pli periferiaj, fronte al multflankismo en la rilatoj inter ŝtatoj. Oni citas la usonanon Richard Haass, kiu lastatempe skribis, ke la minaco tamen ne estas multpoluseco (kontraste al la dupoluseco de la epoko de la malvarma milito), sed manko de poluseco. Harlan Cleveland, diplomato kaj internaciisto, verkis libron antaŭ pluraj jaroj, kiu perspektive trafe aludis al “mondo kie neniu regas.”

Ankaŭ en nia Esperanto-movado, neniu regas plu.

En mia libro *Lingvo kaj popolo* de antaŭ du-tri jaroj, mi argumentis ke UEA kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj devas komplete repensi siajn strukturojn kaj agadmanierojn. Iam UEA kaj aliaj internaciaj organizaĵoj estis simple tutmondaj manifestiĝoj de lande bazita Esperanto-agado, sed pli kaj pli la rilato inversiĝas: Esperanto-agado estas esence internacia, kaj la landaj asocioj devas adaptiĝi al tio. UEA, kiu produktas revuon kaj organizas kongresojn ne sufiĉas. Oni ne plu devas pensi pri gazeto, sed pensi pri komunika sistemo, en kiu gazeto, se entute ĝi ekzistas, estas nur unu elemento. Tiu gazeto ligiĝu al komunikado per la Reto; komunikado per la Reto havu ne nur sian skriban elementon, sed ankaŭ sian sonan kaj bildan elementon. Nenio malhelpas, ke Esperanto-asocio komuniku kun siaj subtenantoj per reta radio, per retaj filmoj k.s.

Notu, ke mi uzas la vorton “subtenantoj.” Tiuj organizaĵoj, kiuj montriĝas plej efikaj en nia nuntempa mondo ne estas tradiciaj membroorganizaĵoj, sed tiuj organizaĵoj, kiuj laboras per kampanjoj – kiuj kolektas monon por specifa celo. En la kazo de landa Esperanto-asocio, tio povus esti enkonduki Esperanton en difinitan lernejan sistemon,

subteni leĝproponon pri Esperanto, lanĉi novan iniciaton ĉe la Reto, ebligi al junuloj partopreni internacian Esperanto-agadon, subteni universitatan kurson pri Esperanto, kaj simile. Konkurenci por liveri servojn kiam tiuj servoj estas senpage haveblaj ĉe la Reto estas perdi tempon je falsa celo. La plej granda servo, kiun ni povas liveri al ni mem, estas disvastigi Esperanton – ĉar ju pli oni disdonas Esperanto, des pli valora ĝi fariĝas al ĉiu unuopa esperantisto.

Kiam oni fondis Esperanto organizaĵojn antaŭ centoj da jaroj, oni espluatis la tiamajn komunikajn rimedojn. Ili nun ŝanĝiĝis; ni ankaŭ ŝanĝiĝu per reformo de niaj labormetodoj kongrue al la novaj rimedoj.

Mi diris, ke la periodo de Zamenhof estis periodo kaj de novaj komunikaj rimedoj kaj de nova optimismo. La komunikaj rimedoj daŭris, sed la optimismo malaperis per la eksplodo de milito. Mi sugestis, ke ni kompletigas ciklon ĉar denove nun venis novaj komunikrimedoj kaj venis nova optimismo. Vi verŝajne akceptos la unuan rimarkon sed eventuale ne la duan. Optimismo? La mondo estas disŝirata de militoj, de genocidoj antaŭ kiuj niaj internaciaj organizaĵoj estas senpovaj, de interreligia malamo, de brutalaj diktaturoj. Minacas nin la diskolapso de la internacia ekonomio kaj la detruo de la biosfero. Optimismo? Mi dirus, tamen, ke jes.

La nuna kongreso, kongreso organizita de amerikanoj, kiuj (el ĉiuj homoj de la mondo) estas funbdamente optimistaj, rekte aliras la demandon pri diverseco en mondo, kiu fariĝas materie unueca sed spirite dividita. Ĝi levas demandojn pri la estonteco de tiu diverseco, pri la elteno de ekosistemoj, pri la daŭrigo de lingva kaj kultura diverseco. Tion farante, ĝi kvazaŭ deklaras, ke ne temas pri nesolveblaj problemoj; ĝi deklaras, ke ni havas la fortojn por forigi aŭ limigi la danĝerojn, kiuj minacas nin; ke Esperanto havas sian rolon en tiu batalo – kaj, ĉefe, ke la mondo de la dudekunua jarcento devas trovi solvojn por la dudekunua jarcento, ne la malnovajn ŝablonojn jam longe elĉerpitajn. Neniu sperta esperantisto povas eviti la konstaton, ke esperantistoj estas originalaj homoj. Nia kapablo pensi laŭ nova maniero estas nun elprovata. Ĉu ni kapablas montri al la mondo, ke la egaleca Esperanto prezentas alternativon al la tradicia malegaleco, ke ĝi havas la potencialon doni voĉon al tiuj, kiuj nuntempe ne havas voĉon, kaj la potencialon mobilizi tiujn homojn? Kaj ĉu ni mem havas la kapablon repensi niajn labormetodojn? Mi kredas ke jes – kaj mi kredas, ke ni estas ĉe la sojlo de nova ondo de preteco alfronti la problemojn de la mondo kaj definitive meti finon al la potencbataloj de niaj retrorigardaj gvidantoj. Tiu nova sento estas rimarkebla multloke en la Amerikoj.

Sed ĝi estas nova nova sento... nova sento kiu ne simple flugas de loko al loko, sed disradias tra reto tutmonda sen centro kaj sen gvidanto. Se Zamenhof vivus hodiaŭ, li verŝajne reverkus sian grandan poemon laŭ la nova metaforo de Interreto – kaj li certe estus en la unuaj rangoj de tiuj, kiuj celas teni la mondon glorie diversa sed pace komunikanta, verda en ambaŭ sencoj.